

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, War-
szawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edin-
burgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili North, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirek-
toro, Kaunas (Kovno)
Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Postkonton Köln 70863, por
Teo Jung, Horrem.
Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke,
H. Hurler, Max Butlin.
Literatura red.: Zanoni.
Kunlaborantoj
inter la Esperantistaro de
la tufmondo.

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Semajna

Kun senpaga monata „Revuo“

Neŭtrala

Abonon ni akceptas ne por fiksa tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

La prezo de unu numero estas por la landoj:
Aŭstra 800 Kr. Ĉeĥosl. 1.20 Kr. Germana 40 Mk. Jugosl. 1.60 Din. Portugal. 0.80 Esk.
Belga 0.50 Fk. Finna 1.30 Fmk. (Germana) abon. Kanado 0.05 Dol. Rumania 3 Lei.
Brita 3/4 P. Franca 0.50 Fk. Ĉe slapoŝtoĉoj Nederl. 0.15 Hfl. Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levov. Hispana 0.50 Pes. Italia 0.70 Lit. Norvega 0.30 Kr. Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.20 Kr. Hungara 30 Kr. Japano 0.10 Yen. Pola 120 Mk. U. S. A. 0.06 Dol.
Baltikanoj kaj rusoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampila Respondo-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4
Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj.
Anoncoj kostas po cm² 0.10 avisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk); rabato laŭ interkonsento.
Specialaj prezoj por eksterlandaj aŭ specialaj numeroj.

Interesajn artikolojn
bonajn, kiuj koncernas nian mov-
adon kaj aferojn de ĝenerala intereso
ni nun bezonas por ET!

Numero 108 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburg, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 29. Oktobro 1922.

Vizitu urbon Jiĉín kaj Rokaron de Praĥov!

Kie la hejmo, la mia hejmo?
Jen vivas en land' floranta
Homo vigne laboranta
Kun bonaj kor' kaj anim',
Kun spirito sen la tim'.
(Ĉeĥa nacia himno.)

Supre notitaj vortoj de ĉeĥa nacia kanto estas tute prava. La karaktero de la diversaj regionoj estas multvaria. Ĉe ni vi trovos ĉarmajn rondvalojn, romantikan montetaron kaj ankaŭ montaran grandegulon. Vizitintoj de la XIII-a bedaŭrinde ne honoris nian rondeton „Comenius“ per sia vizito. Tial mi intencas per sekvontaj vortoj gajni vian intereson kaj inviti vin en nian belegan regionon, nomatan „Bohema Paradizo“.

Jiĉín (275 m super la mara nivelo) eiendas sin en centro de rondvalo, kiun je tri flankoj koronas montoj kun ruinoj de multaj kasteloj aŭ pilgrimaj kapeletoj. Jam el la vagonaro kun surprizo ĉiu vizitanto rimarkas grandan amason de fruktaj arboj, tiel ke Jiĉín'a regiono ŝajnas kiel ampleksa ĝardeno en „Bohema Paradizo“. Jiĉín havas bonan komunikon rekte kun la ĉefurbo Praha (tri horoj), kun Hradec Králové kaj baldaŭ estos finkonstruita transversa fervojo Zittau (Žitava)—Liberec—Turnov—Jiĉín—Hradec Králové. Dum someraj dimanĉoj oni povas aĉeti malaltigitajn vojaĝbiletojn aŭ Praha—Jiĉín kaj reen aŭ rondiran Praha—Jiĉín—Ml. Boleslav—Praha. Oni povas favore uzadi ankaŭ aŭtobusan transporton.

Forlasinte stacidomon ni iras tra la strato de Fügner (ruĝa gvidsigno) preter hotelo „Praha“, kie estas la klubo en YMCA (maldekstre), konstruaĵo de pedagogio (dekstre) en la strato de

Hus, mald. Sokolejo, knabina realgimnazio, antaŭ Občanská záložna (ŝparkaso) estas monumento de M. J. Hus el la jaro 1872, plej malnova en Bohemujo. Placon de Žižka fermas la urba turo el la jaro 1578, kvindek metrojn alta. Ĉe la turo staras nefinkonstruita preĝejo de St. Jakobo (konstruita laŭ St. Jacobo de la Compostela). Pentraĵo sur plafono anstataŭas valbon. Oratorio estas kunligita per koridoro kun la kastelo de Valdstejn sur ortangula placo kun arkado en ĉiuj flankoj.

El la strato de Hus oni povas atingi per la strato de Havlíček tilian aleon, 2 km longan (en 4 vicoj pli ol 1200 tilioj) el la tempo de Valdstejn. Ĉi tiu aleo estas vere mezepoka unikajo. Je la fino de la aleo estas parko Libosad, kun multaj kuriozaj malnovaj arboj kaj belega loĝo. Antaŭ Libosad estas blua gvidsigno sur monton Zebín (400 m). Sur supraĵo antaŭ kapelo de St. M. Magdalena, super ŝtonoj blue signitaj, turniĝas magneta montrilo, se ni forŝovas ĝin ĉirkaŭe, kiel konstatis en 1913 nia nova samideano prof. Malas. Ekzistas ankoraŭ multaj belaj ekskursoj, sed tiuj estos priskribataj en speciala gvidlibreto jam preparata.

El placo (ruĝa gvidsigno) al la gimnazio, Mariánské náměstí (maldekstre reallernejo, dekstre statuoj de Y. A. Komenský (Comenius) preter malnova akvoturo al lago „Kněž“, sur kies bordone forgesebila rigardo al antaŭmontaro de Krkonoše (Kumburk, Bradec, Tábor, Košov) kaj ceteraj montoj: Brade, Rokaro de Praĥov, ktp. Sur monto Veliš estis deponitaj t. n. kompaktoj basileaj, garrantiantaj al

utrakvistaj ĉeĥoj ilian apartenadon al romkatolika eklezio. (Poste neleĝe per la papo malpermesitaj).

Per aŭtobuso oni povas plifaciligi sufiĉe pendonon rigardon de la Rokaro de Praĥov. Por rigardi ĉefan parton de la Rokaro sufiĉas duona tago. Mi preterpasas pensionon de Kryš, maldekstre en arbaron, ekrigardante grupiĝon de rokoj nomitaj Moužénin (nigrolo), kaj daŭrigas nian vojon sur malnova ŝoseo tra la vilaĝo Praĥov al du monumentoj el la jaro 1866 (milito aŭstro-prusa).

De Praĥov'a monumento la ĉefa turista vojo supreniras al Branka kaj tra mallarga strato kaj ŝtuparo sur l. elrigardejon troviĝanta sur abrupta roko, 100 m super profunda arbarigita abismo. Belega elrigardejo: Zebín, en malproksimo Zvičina, Krkonoše, Trosky k. m. a.

De l. elrigardejo pli malproksimen laŭ gvidsignoj preskaŭ post 10 minutoj ni dekstre mal-supreniras nove sin pretigantan Vojon de Masaryk, el ĝi ni eniras en malluman „Bratřská modlitebna“ (preĝejo de B. fratoj). El ĝi sur skolta vojo al elrigardejo je Rokara urbo. Poste ni iras al Vojo de Sendependeco (anst. Imperiesira). Enirante en misteran koridoron, niaj impresoj ĉiam pligrandigas. Nia fantazio vidas ekz. Kranion, reliefon de Napoleono k. m. a. Rekte antaŭ ni grandegaj kunmetitaj manoj esprimas al ĉiuj rokaran preĝon. Mi povas montri al vi ankoraŭ multegajn vidindaĵojn, sed — mankas loko. Al interesiĝantoj mi rekomendas antaŭmendi preparatan gvidlibreton, operontal, se ni gajnos 200 interesiĝantojn. — Nia Klubo de ĉsl. Turistoj respondas ĉiujn turismajn aferojn, en ĉiuj eŭropaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

Dum julio ni aranĝos festeton, kaj petas la gesamideanaron viziti nin! — Do, karaj belegantoj, ĝis baldaŭa revido en „Bohema Paradizo“!
Bobe.

Jes, parolu!

La artikolon „Parolu“ en n-o 106 de ET mi kun intereso legis. Mi ĝojas, ke la verkinto havis la kuraĝon montri al ni nian aferon tia, kia ĝi estas laŭ lingva vidpunkto, pravi al ni, ke ĝi ne estas tia, kia ĝi dezirinde devas esti. Tafa ŝajnas al mi la diferencigo inter Esperantanoj kaj Esperantistoj. Estas vere, ni havas tro multe da „nuranoj“ kaj malro da Esperantistoj, kaj granda parto de niaj „anoj“ ne meritas eĉ ĉi tiun nomon, ĉar tre multaj el ili estas nur sencelaj, seninteresiĝitaj, indiferentiaj „kunkurantoj“.

Se mi volas esti sincera ano de la afero, mi kompreneble okupas min pri ĝi, mi ekstudas ĝin


laŭ ĉiu flanko, mi defendas ĝian ideon, mi kunhelpas atingi ĝiajn celojn. Kaj nia ideo, niaj celoj? Ne laste tio estas la lingvo kaj ĝia disvastiĝo. Do se mi pretekstas esti „ano“ de Esperanto, vera, celkonscia ano, mi plenumas mian devon ankaŭ rilate al la lingvo, t. e. mi ekstudas, mi el-lernas ĝin, mi kunhelpas disvastigi ĝin, mi defendas ĝin kontraŭ indiferentuloj kaj kontraŭuloj, kaj kompreneble — mi parolas ĝin! Mi farigas — por resti ĉe la diferencigo — Esperantisto. Aŭ ĉu ne estas sensencaĵo aserti: mi estas Esperantisto, se mi neniam parolas Esperante, aŭ se mi eĉ ne scipovas paroli?

Kial oni ne parolas? Ĉu oni hontas? Ĉu oni ne kuraĝas? Oni diras: „Ni volas eviti la impreson, kvazaŭ nia celo estus la »malnaciigo.«“ Kontraŭ tia aserto ni diru simple: „Ni parolas Esperante por ne forgesi ĝin, pro ekzerco, por perfektigi, pro tio, ke ni estu kapablaj paroli, se ni bezonas ĝin dum la kunestado kun ali lingvanoj.“ Ĉiu lojala homo komprenos kaj aprobas tion.


Esperantistoj! Vi tute ne timu, ke vi ridindiĝos, ke oni dubas pri via patriotismo, se vi parolas nian lingvon; se vi ne kuraĝas fari tion pro konsidero je aliaj, tiukaze ankaŭ ne legu Esperantogazetojn — ĉar via najbaro eble povus vidi tion! Ne, mi opinias, ke la parolado de nia lingvo antaŭ aŭskultemaj oreloj kaj la legado de niaj gazetoj antaŭ videmaj okuloj povas esti nur utila al nia afero. Ni ne atendu, ĝis kiam la mondo havos la komplezon veni al ni; ni mem devas enpenetri „prilabori“ kvazaŭ alirudi ĝin. Krome mi supozas, ke devetas esti plezuro por ĉiu Esperantisto kiel eble plej ofte interpreti siajn pensojn, ideojn, esperojn kaj dezirojn per nia kara lingvo, aŭdi kaj aŭdiĝi ĝiajn belsonajn vortojn en la rondo de samideanaj amikoj.

Sed senkulpiĝu, karaj legantoj, preskaŭ mi estas forgesinta tion: Vi ja volonte parolas Esperante, sed nur — kun alilingvanoj, kiuj ne komprenas vin naciajn idioletojn — ho, kion vi faras, kompostisto? Ne enmiku vin! — Do, pardonu, mi voils diri: „kiuj ne komprenas viajn naciajn idioletojn“. Ĉefere vi estas tute prava, parolu neniam Esperante kun samlandanoj, neniam ekzerco vin, neniam klopodu perfektigi en la praktika uzado de la lingvo. Certe, kiam venos la onklo el la eksterlando, vi havos mirindan lertecon por interparoladi kun li. Se eĉ ankaŭ li faris la samon, certe baldaŭ ekestos „flua“ konversacio. Bona propagandilo antaŭ neesperantistoj, ĉu ne?

Kial oni ne parolas? Ĉu la ĉefa kaŭzo re estas tio, ke oni ofte ne estas kapabla pro tio? Mi jam foje skribis en ĉi tiu ĵurnalo, ke oni nur



Parto de la Placo en Jiĉín (Ĉeĥosl.).



Parto el „Imperiestra Koridoro“: „Aĝlo“, rantiantaj al

Valorajol.

Printempa mateno... La suno kvazaŭ dukato ruliĝas sur la cejankolora ĉieluko. Ĝi ruliĝas malrapide kaj solene, kiel bonstata valutisto el la Greka strato (la plej viva kaj komercema loko en Odessa). Jes, la suno havas sian difinitan valoron, kaj la lasta povas eĉ pligrandiĝi sur la borso: sekve la suno (ĝi similas ja dukaton!) estas konfidinda objekto; sed kontraŭe — ne ĉiu valutisto posedas difinitan valoron; ekzemple, kion oni povus doni por Maks Leporkal? Nenion, sendube, ĉar nenialo li estas: dum unu tago li povus perdi sian ĉapelon, pantalonon kaj surtuton, ĉar ĉio dependas de lia negocbarometreco, kaj ĝi estas tiel enigmo plena, tiel nepenetrebla por ordinara okulo!

Jen ili renkontis unu la alian: la suno kaj Maks Leporkal. Ili ambaŭ promenas tra la bulvardo: la unua por koma digestado, kaj la dua por iaj misteraj celoj, kiujn nun mi ne rajtas al vi malkaŝi: vi ja scias, kia granda konkurado ekzistas en la mondo, eble vi mem venos bulvarden? Pli bone estus, se vi ĝuus la printempan matenon: belega ĝi estas. La Nigra Maro argenokoloriĝas kvazaŭ skombro. Trankvilo. Silento. La ĉielo lazuras, kaj nur taloke blankas malgrandetaj nubetoj: ili flugas tien kaj reen, subite alproksimiĝante al la glata mara nivelo — jen estas la mevoj. La mevoj! Ili estas malpezaj kiel printempaj revol de junulo, kiu rigardas la unuan fojon en la misterajn okulojn de la naturo. Ili jen flugas ĉirkaŭ blanka lumturo, jen super arbaro de mastoj kaj ŝipantenjoj. Spiraletoj de nigra fumo leviĝas el alta tubo de vaporŝipo. Grandega ĝi estas, tiu ĉi vaporŝipo, kaj longan vojon ĝi veturis ĝis Odessa. El Baltimora ĝi veturigas nutraĵojn por malsatantoj. Rozvanga, grasaj ŝipanoj en bluj

bluzoj kuras sur ĝia ferdeko. Maks Leporkal ilin atente rigardas kaj murmuris preskaŭ ne aŭdeble: „Amerikano“, tio estas mono, kaj mono estas — ĉio. Por mono mi povas aĉeti eĉ la sunon, mi nur ne scias, kion ĝi kostas!“

Leporkal hodiaŭ tre frue komencis labori: „amerikanojn“ li intencis kapti, kaj ĉi tion li sendube efektivigos, ĉar li estas specialisto — Maks Leporkal. „Aliuloj“ promenadu tra la Greka strato kaj atendu, ĝis kiam al ili alvenos „afero“, sed li, Maks Leporkal, ne estas malsaĝulo, kaj li mem kaptos „aferon“. Kvin minutoj pasis. Neniu. Ĉu li perdas monon? (Tempo ja estas mono!) Ne, certe ne — ĉar li kredas sian feliĉ-stelon kiel — la forlikceon de la dolaro kaj la falemon de „sovjetlanda rublo“. Ne stultulo li estas kiel Napoleono, kiu ĉe Waterloo perdis la kredon je sia feliĉ-stelo kaj sendube pro tio pereis. Leporkal nenion perdas, eĉ ne butoneton de pantalonoj kaj sekve ne baldaŭ pereos. Tiu estis „Napoleono“ (ĉar dum decidaj momentoj li estis aŭ mola kiel kuirita nabo, aŭ malsaĝe kuraĝa kiel leono). La sorto mem montris al li la estontecon, ĉar li estas Lepor-kal (facilmova kiel leporo, kaj obstine-persista kiel kalo reaperanta sur pied-fingroj tuj post operacio).

Subite li aperis. Blankevestita, en bluzo li estas. Amerikano, sendube! Kaj Leporkal karesvoĉe demandis:

„Ĉu vi estas Amerikano?“
„Ne, amiko!“
„Sed fremdulo?“
„Por vi — jes!“
„Ĉu vi posedas iajn valorajojn?“
„Jes, ilin ĉiu havas!“
„Sekve ankaŭ vi, ĉu ne? All right, ni aferos!“
Al Maks Leporkal oni povas fidi: li ne ŝtelos.
„Ĉu la sinjoro kun si havas valorajojn?“

„Valorajoj ĉiam estas ĉe ni, amiko!“
„Kion vi diras! Ne ĉiam, ne ĉiel!“ Suspekteme rigardinte policiston ĉe la stratangulo, li murmuris rapide kaj konfidente:

„Tuj oni povas vidi, ke vi estas fremdulo kaj neniam ĝis nun vizitis Sovjetlandon. Alie vi ne portus kun vi viajn valorajojn! Sed »Ce-Ka« (eksterordinara komisiono por politikaj krimoj)? Ĝi estas furioza kaj nedivenebla, kvazaŭ buldoko. Ne estas eble ellegi tion, kio estas skribita en ĝiaj sulkoj. Ĉu ĝi preterlasos vin libera aŭ ek-mordos viajn pantalonojn aŭ ilibarkojn? Ne, sinjoro, ni almaniere konservas niajn valorajojn! Jen ĉebudo staras ĉifonulo: Li vendas cigarojn, bombonojn, nebruligeblajn alumetojn. Abraŝa — li estas mia filo! Leria fripono li estas, ĉar de sia infanaĝo li kuliĝis aferi. — He, »Vanderbilt« (amerika miliardulo) ĉi tien! Montru al la sinjoro »sonoriletojn.«) Malkare mi povas ilin vendi al vi, ĉar la Vrang-el-kurzo“) nun ne estas alta: kolektu ilin — post dek jaroj ili fariĝos malofitajo, kaj vi multegon gajnos. Ha, mi eĉ forgesis! Ĉu vi vidis, kiel al ni venis Abraŝa? Ĉu li tuj kuris, kiam mi vokis lin? Ne, antaŭe li ĉirkaŭrigardis ĉion kaj poste solene kaj malrapide, suspekteme alpaŝis ĉi tien! Bravulo li estas! Vera amerikano, ĉu ne? Li ricevos de mi kukon!“

Sed juna »Vanderbilt«, ceremonie forirante, respondas solene:

„La diablo manĝu vian kukon! Donu svisan frankon!“

„Ĉu vi aŭdas, sinjoro?“ — flere kriis Leporkal — ho, li estas vera mia filo, ĉu ne? Sed, ni iru!“

*) Kreditbiletoj de la Armeo de Denikin dum la jaroj 1918—19, kiuj nenion kostas, sed sonas per siaj ciferoj.
**) Generalo de blankuloj.

„Kien?“
„Kviete ni priparolu la aferon en tiu kafejo: tie neniu al ni malhelpos. Tie ankaŭ estas bonaj pesiloj... ĉu vi opinias, ke mi pagas procentojn al la kafej-mastro pro falsa peso? Ne, Maks Leporkal ne estas »aliulo«, tion li ne faros.“

La fremdulo ŝajne ne komprenis, sed li ne kontraŭdiris, kaj ili ambaŭ eniris la kafejon.

„Nu, kion vi havas?“ demandis Leporkal. „Ĉu dolarojn, aŭ funtojn? Eble mono vin ne interesas? Kaj vi deziras malofitajojn: eble tapŝojn? Ho, Leporkal tuj montris persajn, la plej verajn, ĝuste el Tavrizo (sur ili estas broditaj pantofloj). Nur dezireton vi diru al mi... Eble vi bezonas porcelanon? Beletan Sevr'ajon mi vendos al vi: tiel dire ĝi degelas en la manplato. Vi estas mal'kontenta? Ho, »Ce-Ka« min prenu! Kion vi volas? Malkaŝe diru al mi. Mi trege suferas pro nesacio. Eble librojn? Ĉiu biblioteko estos malfermita por vi, kaj mi povas preni el ĝi kiun ajn libron kaj vendi al vi. Eble pentraĵoj vin interesas? Ha, stultulo mi estas. Mi komprenas, kion vi bezonas — ne konfuziĝu, ĉi tio en Odessa estas tute konvena kaj deca, precipe en la nuna tempo. Vi nur diru: ĉu blond- aŭ nigr-haran? Junulino aŭ sinjorino? La unua estos sendube pli kara, sed por vi tio ĉi estas bagatelo, ĉu ne? Ho, ĉion mi povas doni!“ memkontente kaj dolcemiene murmuris Leporkal kaj salivo aperis sur liaj dikaj ruĝaj lipoj. Li tremis, kvazaŭ li mem ĝuus belulinon.

„Ĉion vi povas doni...“ ripetis la fremdulo, severe rigardante la malgrandan staturon de Maks Leporkal. Malkonfido brilis en liaj profundaj, bluaj kaj larĝaj okuloj. „Ĉion li povas doni — sensensajo!“ li ŝajnis pensi. „Ĉu li aŭ la vivo ĉion povas doni? jen la demando!“

malofte renkontas samideanojn, kiuj senerare sci-povas paroli. Senerare? Ho, mi estas preta malplaltigi ĉi tiun postulon, mi volonte pardonus gramatikajn erarojn, mi kontentigus, se ĝenerale oni scipovus komprenigi sin. Sed bedaŭrinde la atingon de ĉi tiu minimumo oni ne povas konstati ĉe multaj el niaj anoj, el kiuj kelkaj eĉ dum jaroj pretekstas esti Esperantistoj. Ĉu mi diris tro multe? Laŭ tio, kion mi ekspertis, ne. Ankaŭ ne laŭ la Esperantaĉo en la „korespondoj“ de sam- kaj alilandanoj. Mi tre ofte havas okazon legi tiajn korespondaĵojn.

Ree mi devas demandi: Pro kio oni ne sci-povas paroli? Pro tio, ke oni neniam paroladas. La celkonscia komercisto, kiu bezonas la scipovon de iu lingvo, vojaĝas en la koncernan landon por elfunde eklerni la lingvon, aŭ almenaŭ li serĉas en sia propra lando plej ofte okazon por paroli ĝin; li bone scias, ke estas neeble, regi iun lingvon sen aŭdi kaj paroli ĝin.

Kaj kio estas la kaŭzo, ke el niaj eĉ kelk-dekaj kursanoj eltenas nur irion, el kiu plia parto forestas post kelkaj semajnoj? Ĉu eble tio, ke mankas la spirito, la ligilo — la lingvo? Ni ne scias allogi la novulojn, ni ne scias igi al ili la aferon interesa, ni ne donas al ili okazon uzi la lernitan lingvon, montri siajn parolkapablojn. La „afero“ por niaj komencantoj estas ekskluzive la lingvo. Jam ofte oni konfesis al mi, kiam mi riproĉetis ĉi tiun aŭ tiun pro lia forrestado: „Kion mi faru ĉe vi? Oni ja ne parolas Esperante, mi ja ne povas apiki tion, kion mi lernis, tiamaniere mi eĉ ne scias, pro kio mi eklernis Esperanton, la afero ne plu havas intereson por mi, mi pli bone povas uzi mian tempon.“ Foje sincera kaj fervora ano de nove fondita laborista grupo plendis al mi: „Mi ne scias, kion mi pensu pri nia afero. Nia grupo fondiĝis kun 60 membroj. Estis aranĝata kurso kun granda „bruado“. Dum la unuaj instruhoroj la instruanto parolis nur Esperante kun ni. Ni ĝojis konstatante de semajno al semajno niajn progresojn. Sed poste la instru-anto forlasis ĉi tiun kutimon kaj post la finiĝo de l' kurso neniu zorgas plu pri ni. Oni lasas nin tute solaj. Mi klopodis regule kunvenigi niajn grupanojn. Sed sen ia incito, sen ia helpo ni ne scitis kion fari. Nuntempe venas al niaj „kun-venoj“ nur la grupestro, la kasisto kaj mi. La bedaŭrinda kasisto! Ni ĉiuj havas la impreson, ke la ĉefajo por la aranĝintoj de la kurso estis nur la pagiĝo de la lecionoj.“ Kompreneble mi provis senkulpigi la aranĝintojn kaj forviŝi tian impreson. Sed estas bedaŭrinde, ke tia opinio povas enkapigi. Do samideanoj! Se vi fondas grupojn kaj aranĝas kursojn, ne forlasu la lern-antojn post la fino de la kurso, zorgu ankaŭ poste pri ili, faru el ili perfektajn Esperantistojn!

Ankaŭ en la malnovaj grupoj la ĉefajo estu la lingvo. Kiamaniere la grupanoj, novaj kaj malnovaj venku sian forgesemon, kiel ili perfektigu, se ili ne parolas? Sed kion oni ofte faras dum la kunvenoj? Oni babilas. Nu, ankaŭ mi ŝatas sendevigan babiladon, sed kiel oni ne babilas Esperante?! Ne estas necese pritrakti aliajn temojn kaj gravajn problemojn, ne estas necese ekskluzive paroli pri nia movado. Ankaŭ en Esperanto oni povas babilu pri ĉiuj ĉiutagaj, ordinaraj aferoj. Sed ŝajnas ofie, kvazaŭ unu timus la alian; kvazaŭ ĉiu gardus sin elparoli eĉ la vorton Esperanto. Mi parolas laŭ miaj propraj spertoj. Ĉu tio estas ĝenerala kutimo, tion mi ne scias, mi tre ĝojus, se mi ĉi tiurilate erarus. En iu grupo en urbeĝo oni havas la kutimon, dum la kunvenoj (ĉeestas ofte pli ol 80 personoj) fari en Esp. publike paroladojn, proponojn, kontraŭ-proponojn ktp. — certe ŝatinda entrepreno. Sed ne ĉiu ŝatas kaj kuraĝas publike paroli, precipe ne la malpli spertuloj. Ili tiamaniere havas okazon nur por aŭdi Esperanton, sed ne por paroli ĝin. Sendeviga interparolado devas sekvi tiajn publikajn paroladojn.

Ĉi tiun nekontentigan lingvan aferon ni ne povas plibonigi per plendoj kaj riproĉoj. Ni peju trovi rimedon. Ekzistas nur unu: paroli. Parolu mem, vi kuraĝuloj kaj spertulc kaj helpu kaj eduku viajn malfirmajn kamaradojn. Ne kondamnu, ne ridindigu ilin, per tio vi certe baldaŭ perdus ilin.

Parolu, se vi renkontas samideanon, parolu dum viaj ekskursoj, parolu ankaŭ dum viaj kun-venoj, kaj la spertuloj ne apartigu sin. Estas kompreneble pli oportune paroli kun samprogres-uloj ol kun komencantoj; sed komencanto ne multon lernos de komencanto, sed profiton li havos nur per la interparolado kun perfektuloj. Pro tio intermiksiĝu. Unu helpu la alian, unu kontrolu la alian, unu korektu la alian. Kaj nepre ne preteriru nekonatajn vortojn, ne anstataŭu ilin per nacilingvaj; penu trovi por ili bonajn Esper-anto-esprimojn, kion unu ne scias, tion eble scias alia.

Samideanoj! Ne kredu, ke vi akiris ion per aranĝo de multnombre vizitataj kursoj, ke sole per tio vi kreis jam Esperantistojn. Do zorgu, ke la kursanoj kaj grupanoj fariĝu tiaj, ke vi fla-maniere havos pliajn kunhelpantojn por la dis-vasitigo de nia lingvo.

Mallerta.

Disigo aŭ Koncentrigo?

1. Iom pli ol recenzo.

Antaŭ mi kuŝas nova revuo Esperantista. Formato iom granda por tiuspeca gazeto; papero kaj preso bona; aranĝo parte plaĉa, parte — precipe la kovrilo — malpli plaĉa; enhavo: 20 paĝoj da rakontoj, poemoj, muziknotoj, reprodukt-ajoj de pentraĵoj, ktp.

La revuo portas la titolon „Literatura Mondo“. Eldonejo troviĝas en Budapeŝt. Kiel redaktoro signas D-ro Schwartz, kunredaktantoj estas s-anoj Baghy, Kalocsay, Balkányi, Lengyel kaj Bayer.

Sian alvokon al la legantoj la nova revuo komencas jene: „Naskiĝis gazeto. Gepatroj, parencoj, konatuloj staras ĉirkaŭ la lulilo kaj penas, kion flimema espero, diveni la sorton de la novnaskito.“

Sed malgraŭ sia flimemo la eldonantoj revas „pri granda duonmonata internacia revuo 80-paĝa“, ĉar ili estas „Esperantistoj, do revemuloj profes-iaj“.

Oni eble rememoras, ke — antaŭ la eldonado de ET — mi ankaŭ volis „en unu tago konstrui Roman“ revante pri baldaŭa „ĉiutaga ĵurnalo Esperantista“. Sed, rapide sanglĝite de mia revemo, mi tuj komencis sekvi pli realan vojon. Kaj mi timas, ke ankaŭ la eldonantoj de „Literatura Mondo“ baldaŭ seniluziiĝos, kaj ke post 3—4 numeroj la regula aperado jam devos esti interrompata pro neantaŭviditaj altegaj elspezoj kaj nesufiĉaj enspezoj. Cetere la eldonantoj de L. M. neniel disponas pri la favoraj cirkonstancoj, kiuj helpis min ĉe la eldonado de ET: propra preselo, fakulaj scioj, efektiva manko de vere aktuala, relative malmultekosta kaj tamen defiekton evitanta ĵurnalo, tuja internacia kunlaborantaro jam ĉe la unua numero, ktp.

Ke Esperantistoj estas „revemuloj profesiaj“, estas bedaŭrinda fakto. Guste tiu revemo estas la plej granda baro sur la vojo al la venko. Tamen ni ne rajtas preni ĝin kiel neŝanĝeblan destinin; male, ni devas iom post iom eduki la Esperantistaron al serioza, reala laboro por nia afero. ET sukcesis kaj prosperis ĝis nun nur pro sia gvidado laŭ realaj vidpunktoj.

Kompreneble kiel ĉiu nova gazeto, ankaŭ L. M. ne volas konkuri kun iu ajn jam ekzistanta gazeto. Ĝi volas esti pure literatura organo, anstataŭaĵo por iamaj „Lingvo Internacia“ kaj „La Revuo“. Tamen: ĉu ĝi estas necesa? Dezirinda ĝi eble estas, sed ĉu necesa, pri tio oni rajtas forte dubi.

Unu el la nunaj redaktantoj de L. M. mem konfesis antaŭ nelonge, ke li ne aprobas la inten-

itan fondon de L. M., kaj alia nuna redaktanto de L. M. skribis al mi en februaro de tiu ĉi jaro laŭvorte: „... oni persvadis min por akcepti la redaktadon de iu pure literatura revuo, sed mi rifuzis. Laŭ mia modesta opinio estus plej prudente, se kvaronjare iu el niaj gravaj pres-organoj mem eldonus beletristikajn kajeron. Ne mil aŭ milionojn da gazetoj, revuoj ni bezonus, sed sufiĉus 5 aŭ 6, sed bone organizitaj kaj sub-tenitaj, kiuj impone influus la publikon ne-Esper-antistan.“

En letero de 5. marto nunjara la sama samideano interpretas deziron de literaturamantoj, vidi „ĉiu-monatan eldonadon de beletristika revuo de ET“.

Tiun deziron mi intencis plenumi, kompletig-ante ET per aparte abonebla t. n. „Literatura Aldono“; bedaŭrinde ĝi montriĝis tro granda balasto por la administrado, kvankam ĝi trovis bonegan akcepton. Tial mi nun volis anstataŭi ĝin per ĉiumonata senpaga „Revuo“, kiu tamen ne estos pure literatura. (Pri la „Revuo“ mi parolos ankoraŭ aliloke.) Nun la eldonantoj de L. M. petis min ne eldoni la senpagan Revuon. Sed pro la prestiĝo de ET kaj ankaŭ pro prin-cipo (legu pli malsupre) mi jam ne povas rezigni la eldonadon.

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la enhavo de L. M.

Estis bona ideo, ke en la unua kajero ĉiu kunredaktanto (escepte la ĉefredaktoro, kies nomo mankas inter la aŭtoroj) sin prezentu per unu aŭ diversaj kunlaboraĵoj; sed ĉiuj aŭtoroj estas hun-garoj, kaj alilandaj samideanoj tute mankas.

La literaturaĵoj estas laŭ karaktero kaj kvalito similaj al tiuj aperantaj en la felletono de ET: taŭgaj — kiel ili — por la ĝenerala publiko, facile legeblaj kaj „digesteblaj“, sed neniel majstro-verkoj kontentigantaj la delikatan guston de lite-ratura specialisto. Mi konstatas, ke la talentaj s-anoj Baghy kaj Kalocsay verkis jam pli bonajn poemojn ol tiujn publikigitajn en la unua kajero de L. M.

Laŭ gramatika kaj stila vidpunkto la enhavo estas bona. Tamen mi devas kritiki kelkajn pli-malpli riproĉindajn erarojn: Ŝi estis kvazaŭ la kopio de ŝia (anst. sia) fratino. — Ŝi malespere flirtigis ŝian (anst. sian) naztukon plenploritan (?). — La filo kaptis (?) al la rando de la tablotuko. — Ili (la sukcesoj) forrabis sian (anst. lian) tempon, siajn (anst. liajn) sonĝojn. — Oni montris tie Napoleleon kvazaŭ sklavon (?) de lia ĉirkaŭajo. — Li demandis de (?) Ariuro. — Ili iras brako (anst. -n) en brako. — La sorto disigis ŝin de sia (!) amato. — Disputo (anst. diskuto, dufoje sur pĝ. 20). — Nekomprenebla frazo en rubriko „Biblio-grafo“: ... mi ne povas deteni min, ke ne inter-pretu miajn pensojn per kelkaj linioj.

Kelkaj preseraroj ne ĝenas.

La kvin ilustraĵoj ne rilatas al la teksto, ili nur servas por plibeligi la revuon.

Pri muziko mi ne estas sufiĉe kompetenta por povi juĝi pri la notoj, komponitaj de A. Gurlev laŭ ĉarma teksto de J. Baghy.

Kiu deziras specimenan numeron de L. M., skribu al la administrejo en Budapeŝt VI, Andrassy-ut. 81, samtempe sendante unu visan frankon aŭ kvar nove stampitajn respond-kuponojn.

2. Propono pri koncentrigo.

La eldonejo de „Novaj Tempoj“ en Sassetot par Bacqueville (Seine Inf.), Franclando, petis min pri publikigo de sekvanta

Cirkulero

al redaktoroj de la Esp.-gazetoj:

Internacia Pedagogia Revuo
Nova Tempo
La Esperantisto
Unuigita Tuthomaro
La Teristo ktp.

Estimata Samideano!

Mi vin petas atentigi pri la tuta seriozeco de la propono esprimita en tiu letero.

Ĉerca Instruo.

Laŭ H. Heine.

*Patrino al la abel':
Gardu vin kontraŭ kandel'!
Sed kion diras patrín,
Abel' ne atentas ĝin.*

*Ĝi flugas ĉirkaŭ la lum',
Flugas kun laŭta zumzum',
Ne helpas patrina pe':
Abeleť, abeleť!*

*Juna sang', flama kor',
Celas de l' patrino for,
Celas al la ruĝ-flameť...
Abeleť, abeleť!*

*Nun ĝi brulas kiel torĉ',
Venis morť, pasis sorĉ':
Gardu vin ĉe knabineť,
Ho fileť, ho fileť!*

Esperantigis D-ro Emil Pfeffer.

Diversaĵoj.

Kiom kostas al mondo vivadi.

La fakto, ke ĉie tra la mondo, escepte en landoj influitaj de specialaj kaŭzoj, kiel ŝanĝiĝ-antaj valutoj, la prezoj inklinas resti je sama nivelo kaj ne multe ŝanĝi, montriĝas el ciferoj prestaj en la oktobra numero de la Internacia Labora Revuo, la monata eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj en Genève. „La mallargaj limitoj de la lasttempaj ŝanĝiĝoj montras la atingon de periodo de rilata staremeco“, diras artikolo en la Revuo pri »Vivkosto kaj pomalgrandaj prezoj«. „Escepte en Germanujo, Aŭstrujo kaj Polujo, kie prezoj senĉese kaj rapide

Kvankam propaganda periodo ankoraŭ ne finiĝis, oni povas diversflanke konstati, ke Esperanto jam eniras la praktikon. Oni ofte plendis, ke nia movado ne rapidas en komuna publiko, kiu ne tre precize sentas la nepran necesecon de internacia lingvo. En la nuna tempo post-milita, la akcelo de nia movado kuŝas en praktika uzado de nia lingvo ĉe la fakaj medioj.

Jam kelkaj gazetoj uzas Esperanton por difinita ne-Esperantista celo. Ili pravas al interesata publiko faka, ke Esperanto estas bonega rimedo por facile, nemulte-koste, do praktike diskonigi celon aŭ idealon tra la mondo. Ili evidentigas la bezonon ĝis nun ne tre sentitan pri lingvo tutmonda al nova publiko nur konsideranta sian fakan celon. Fakaj Esp.-gazetoj per publikigo de gravaj ĉiutandaj dokumentoj tradukotaj nacilingven enfakigas novan propagandometodon nepre trafan, tiel ke iamaj malamikoj de Esperanto devas konfesi ĝian praktikan utilecon. Praktika utiligado de la lingvo estas la miriga potenco porforte trudanta Esperanton al ĉiu homo pen-sakapala, kiu volas helpi en la fako de la ŝatata. Kompre-noble tiu publiko p-iste sin malfermos al tuta Esperanismo, homara idealo, vivseneco de nia lingvo.

Vi tion komprenis eldonante vian gazeton. Edukado kaj pacifismo estas vere la plej bonaj medioj, kie povas flori Esperanto, kaj partianoj de l' internacia kultur-klerigo kaj de l' universala etiko estas tiel multenombraj, ke oni povas per Esperanto fari grandajn servojn tuj konstateblajn.

Sed la plej granda malhelpo por tiu nova propagando kuŝas en la diseco de la penoj kaj en la multeco de la gazetoj. Aperas por celo proksimume sama tro multe da Esp.-gazetoj:

1. Internacia Pedagogia Revuo, organo de l' Esper-antistaj edukistoj;
2. Nova Tempo, organo de pacifista kulturcelado;
3. La Esperantisto, dediĉita al la „Internacia Ideo“ kaj organo de la Popoluniversitato Esperantista;
4. Unuigita Tuthomaro, dediĉita al homaranismo;
5. La Teristo, organo de individualista naturismo;
6. Novaj Tempoj, organo de popoledukado.

Mi memorigas al vi la voĉdonon de la Praha kongreso koncerne la Esp.-gazetaron: „Multeco de la gazetoj ne estas nepra signo de forta sano en nia movado. Ni ne kreu novajn gazetojn senpripense ĉu ili povas facile vivi kaj ĉu ili ne dialgas la penojn...“

Tial mi proponas al vi studon pri la demando koncerne kunigon de ĉiuj ĉi gazetoj en la sola revuo: „Novaj Tempoj“.

La gazeto „Novaj Tempoj“ aperis en januaro 1922. Ĝi servas sendepende kaj nesektime la altan idealon de Edukistara Internacio: nova edukismo, lukto kontraŭ malamo kaj milito, universala unuforma lernejo. Edukistara Internacio kunigas nun dek grupojn naciajn el efektive pacifistaj edukistoj, de jam du jaroj uzas praktike nian lingvon, kaj en sia lasta kongreso (Paria, 14.—16. aŭgusto 1922) jene alvokis: „La tutmonda edukistoj estas varme petataj lerni kaj praktiki la lingvon internacian plej disvastigatan, t. e. Esperanto.“ Publika tute ne Esper-antista sin interesis pri nia gazeto „Novaj Tempoj“, eklernis Esperanton, povis legi gravan dokumentaron kaj tiel ekkonacis pri neceseco de organo internacia redaktata en, unu nura lingvo. Nia gazeto bone prosperas. Ĝi estas tute memstara, ne nur enpresas oficialajn doku-mentojn de Edukistara Internacio, sed ankaŭ ĉion, kio rilatas al progresema edukado, edukistaj kongresoj, metodoj kaj eksperimentoj. Ĝi akiris jam famon en multaj medioj kaj ĉiumonate liveras artikolojn al naciaj fak-gazetoj. La aperigo de tiu ĉi gazeto estis al ni trudita de la faktoj ĵus okazintaj en edukista mondo: Interesiĝo de Edukistara Internacio al internacia lingvo kaj jama utiliga uzado de Esperanto por interrilatigi la pacifistajn edukistojn el ĉiuj landoj ekster ĉia lingva propagando.

Nia deziro estas, ke „Novaj Tempoj“ fariĝu la komuna organo pri universala popoledukado, efektiva pacifismo kaj etiko tutmonda per kunigo de ĉiuj homar-idealaj fortoj. Ĝi restos progresema sed nesektiema. Ĝi laboros por efektiviĝo de „Novaj Tempoj“ idealaj. Kompreneble la komuna gazeto rezervus apartajn paĝojn por temoj speciale studataj de la nun aperantaj kultur-gazetoj. De nun ni estas pretaj akcepti ĉiun vian artikolon pri klerigo, pacifismo, edukado, eĉ informojn pri via fakorganizo Esperantista. Ni deziras baldaŭan interkonsenton por grupigi la diversajn abonantarojn. Jam 8—12 paĝa (formato 80×28), presita en Germanio, regule ĉiumonata, „Novaj Tempoj“ povus fariĝi 16 paĝa, kvankam ties nuna abonkosto estas nur 1/3 de meza laborista tagsalajro. Monon ni ne ja celas, sed idealon kaj laboron. En la nuna konfuza baraktado kaj putriĝo de la mondo, ĉu vi volas, per kunigo de niaj fortoj, interhelpi por intelekta kaj morala flegado de la grave vundita postmilita homaro?

Vian baldaŭan leteron atendente, akceptu, kara Sam-ideano, miajn korektajn fratecentojn.

Por Novaj Tempoj.

Via

E. Vittecoq
Sassetot par Bacqueville
(Seine Inf.), Francio.

„Jes, jes — mi povas — beletan, dekseplaran; ŝi estis en Parizo kaj... vi estos kontenta, mi garantias.“

„Vi eraras, amiko, diboĉulo mi ne estas!“ seke respondis la fremdulo. Kaj poste aldonis mal-ga'e, dolorplene, sed trankvile: „Mi bezonas aliajn valorajojn ol tiuj, pri kiuj vi parolas. Mi vidas: miajn valorajojn vi delonge jam perdis: ĉu vi povus ilin retrovi?“

„Ĉion mi povas!“ dolĉe ripetis Leporkal, „sed...“

„Ha, vi plejpotenca, tuj trovu ilin, tuj trovu ilin, vi frenezulo!“

„Kio?“ Leporkal ekmiris: „Jen estas mirindaĵo — ŝajnas, ke li min insultas?“ Kaj poste li demandis afable: „Kiu vi estas, sinjoro? eble komunisto?“

„Mi estas Via Sinjoro, Jesuo Kristo, la unua komunisto el Galileo.“

Originale verkis Vsevolod P. Ivanov.

La elektra lumo.

De Joh. Ev. Schweiker.

La elektra lumo estas bela ajo, ne nur por la urbanoj sed ankaŭ por la vilaĝanoj.

Jam de longe la loĝantoj de la vilaĝo N. de-ziris la instalon de elektra lumo en siaj domoj kaj ŝtaloj, ĉar la petrolo estis tiel malbona kiel multekosta.

Fine tiu ĉi intenco estis aprokata en komuna kunsido, kaj ankaŭ baldaŭ realigata.

Nun la vilaĝanoj havis elektran lumon. Sed ne ĉiuj estis kontentaj pri ĝi.

Iun dimanĉon posttagmeze multaj kampuloj sidis en la vilaĝa gastejo „Ruĝa Bovo“ kaj trinke-ante bieron disputis fervore pri la nova afero.

„Se mi estus scilinta, ke tiel granda kaj peza aparato estos starigata sur mia malfortika dom-

egmento, mi ne estus konsentinta je la instal-o. Minacas la danĝero, ke la aparato dispremos la tegmenton, kaj ke ĝi aliflores ĉe fulmotondro la fulmon sur mian domon,“ diris kolere unu el la kampuloj.

Alia diris: „Mi timas, ke eble brulo estiĝos sekve de troa aŭ neĝustia uzo de tiu ĉi lumo.“

„Ne estus domage,“ respondis lia najbaro, „se via domaĉo malaperus!“

„Mia domaĉo, domaĉo,“ krlis la alia ofendite. „Mia domo estas pli kara al mi ol via per grandaj ŝuldoj ŝarĝita nova domo!“

„Nu, miajn ŝuldojn vi ja ne bezonos pagi, naj-baro, kaj tial silentu pri tio!“

„Mi diras nur, kio estas vera! Ĉu vi kom-prenas?“

„Silentu, mi ripetas, aŭ mi batos vian imper-tinentan buŝon!“

Estiĝis granda bruo en la gasteja ĉambro. Kelkaj favoris tiun, aliaj la alian najbaron. Kaj preskaŭ bataleto ekkomenciĝis. Nur la prudentaj kaj trankviligaj vortoj de la mastro finis la mal-agrablan disputon. —

Dume sur unu el la multaj metalfadenoj, kiuj estis streĉitaj de domo al domo, sidis du sturnoj — li kaj ŝi. Iliaj plumoj brilis en la suno kiel nigra silko. La du birdoj interparoladis.

Li: „Ho, kiel beleĝa estas la hodiaŭa tago! La suno ridas, la ĉielo estas blua, malvarmeta venteto blovas!“ Kaj li movis siajn flugilojn pro ĝojo.

Ŝi: „Jes, jes! Kaj kiel agrablaj estas tiuj ĉi metalfadenoj, sur kiujn ni povas eksidi por kanti, por varmigi kaj purigi nin. Kredeble la loĝantoj streĉiĝis ilin sole por ni!“

Li: „Mi ankaŭ supozas tion, ĉar alian celon mi ne vidas.“

Ŝi: „Ho, kiel bonaj estas la homoj!“

Al tio mi deziras aldoni mallongan komenton. La proponon de s-o Vittecoq mi opinias tute saĝa. Kunigi, koncentrigi la fortojn! Jen kion nia movado bezonas, se ĝi fine trapenetru la indiferecon de la mondo. Ĉu „Novaj Tempoj“ mem estas la plej taŭga organo, por ensorbi la aliajn, tio estas alia demando, kiun mi ne riskas respondi. Pri tio eventuale decidu la eldonantoj resp. eldonintoj de la aliaj organoj.

Cetere, laŭ mia scio, „Nova Tempo“ ne plu aperas; „La Esperantisto“ ŝajne ankaŭ ĉesis aperi; de „Unuigita Tuthomaro“ mi delonge nenion aŭdis aŭ vidis, do ankaŭ ĝi supozeble iris la vojon de ĉio mortema; restas „La Teristo“, kiu venas el Ruslando, kie depost la fino de la milito ĝis nun aperis nur efemeraj Esp. gazetoj, kaj „Internacia Pedagogia Revuo“, kiu aperas nur kvaronjare (?).

Ŝajne la tuta fako ankoraŭ ne estas matura por vivteni propran organon. Ĉu ne estus plej saĝe tute rezigni propran organon kaj anstataŭe aranĝi revu-forman aldonon pri tiu fako al ET por ankoraŭ pli multe koncentrigi la fortojn? Mi ne insistas, mi nur konsilas.

3. La vidpunkto de ET.

Nia movado estas relative ankoraŭ malforta. Tial estas senŝence disigi la fortojn kaj nepre necese koncentrigi ilin. Alie ni restos sensignifaj por eterne, kaj la mondo ne ĉesos mokridi nin. Kunigi fortojn, tempon kaj monon! Jen vere saĝa principo! Jen la ŝlosilo por la venko! Iom post iom la Esperantistaro ekkonas la neceson de tiu principo. En Helsinki oni jam faris bonan komencon sur la vojo al la koncentrigo.

Speciale la supre dirita validas ankaŭ por la gazetaro. Mi volas ĉi tie mallonge ripeti, kion mi pli detale jam priiraktis en la specimena numero de ET (aprilo 1920).

Nacia propagando-gazeto estas utila por ĉiu sufiĉe disvastigita lingvo; sed la naciaj propagando-gazetoj devas esti redaktataj en **nacia** lingvo (ankaŭ la kroniko); ĉar per la naciaj propagando-gazetoj la publiko estas gajnota por nia ideo. Sed la publiko ne komprenas nek priatentas Esperante presitan propagando-rubrikon aŭ kronikon.

Super la naciaj Esp. gazetoj staru unu granda, almenaŭ ĉiusemajna **internacia** **ĵurnalo**, redaktata nur en Esperanto. Tiu ĉi ĵurnalo estu unuavice pri-Esperanta, due per-Esperanta, kaj per tio samtempe ankaŭ por-Esperanta.

Krom la naciaj propagando-gazetoj kaj la ĉiusemajna internacia ĵurnalo estas ankoraŭ dezirindaj diversaj fakaj organoj, kondiĉe ke ili havu sufiĉe da apogo por daŭre ekzistadi sen deflito kaj ke ili ne trouzu laborforon, tempon kaj monon de siaj abonantoj je la damaĝo de la ĝenerala internacia Esp. movado. Alie estus preferinde, ke la semajna ĵurnalo disponigu al la diversaj fakaj organizaĵoj certan lokon, eventuale tutajn aldonojn revuformajn por koncentrigi la fortojn kaj eviti **disigon**. **La ĉiujn Esperantistoj, ekzemple, povus pli facile pagi ununuran jarabonon de 25 avisaĵ frankoj al unu grava semajna ĵurnalo kun diversaj revuformaj aldonoj ol po 10 svls. fk. al 4—5 sen-signifaj monataĵ revuetoj.**

Tio signifas, ke — aldonante al ET ĉiusemajne 8-paĝan revuon jen pri literaturo kaj arto, jen pri scienco kaj tekniko, jen pri kulturo kaj homara progreso, jen pri komerco kaj ekonomio — mi devus supozeble plialtigi la abonprezon por ĉiuj landoj je 10 aŭ 20%, sed la legajo estus plimultiĝata je ĉ. 60%, kaj la legantoj de ET ne plu bezonus pagi por abono de koncernaj specialaj revuoj. ET mem per tio gajnus gravan internan kaj eksteran plivaloron, je la prestiĝo kaj utilo de nia tuta movado.

Laŭ tiu vidpunkto mi agis ĝis nun kaj agos ankaŭ estonte. Tio estas principo. Mi ne celas **monopolon**, t. e. ekskluzivecon de ET. Mi nur celas la **prosperon** de nia movado per koncentrigo de la fortoj. Ĉiu malŝparo kaj disigo de fortoj efikas kontraŭ la interesoj de nia movado. Kaj ĉiu samideano, kiu malatentas tiun principon, estas vole nevole, malgraŭ sia eventuala entuziasmeĝo kaj idealismo, malamiko de Esperanto.

Pri tiu temo mi ankoraŭ parolos je konvena okazo. Mi petas ankaŭ aliajn kompetentajn samideanojn eldiri libere kaj senpartie sian opinion pri la grava gazetara demando.

Teo Jung.

IREKO.

Internacia REVELO-Kunveno.

Antaŭ la XV-a multaj samideanoj el norda kaj okcidenta Eŭropo kaj ankaŭ el Ameriko kolektiĝos en Köln por komune vojaĝi al la kongresurbo. Por plifaciligi kaj plilagrabiligi al la kongresanoj ĉi tiun vojaĝon, la REVELO (*Rejnlanda-Vestfalia Esperanto-Ligo*) decidis okazigi sian kutiman jar kunvenon kiel internacian kaj kunigi ĝin kun karavano al la kongresurbo.

Detalojn pri la projekto ni ankoraŭ sciligos. Jen la ĝenerala plano:

Unua tago, vizito al la urbo Köln, vespere oficiala salutvespero kun partopreno de oficialaj korporacioj ktp., poste koncerto. Dua tago matene, veturo en rezervitaj vagonoj aŭ per speciala vagonaro al Koblenz. Tie antaŭtagmeze oficiala propaganda kunveno. Tagmeze veturo per speciala ŝipo sur la Rejno al Wiesbaden. Tagmango sur la ŝipo. Fruvespere veturo per vagonaro al Frankfurt a. M. Tie eventuale komuna partopreno je koncerto; noktiĝo. Tria tago antaŭtagmeze, rigardo al la urbo Frankfurt. Posttagmeze komuna veturado en speciala vagonaro al Nürnberg. Tie alveno al la salutvespero.

Sciligoj pri la IREKO estos publikigitaj regule sub la oficialaj sciligoj de la XV-a en ET kaj en aliaj Esp. Gazetoj. Aliĝilojn ni aldonos al ET

post kelkaj semajnoj, kaj jam hodiaŭ invitas la gesamideanaron, multnombro partopreni je la kunveno, kiu moniros al la partoprenontoj en mallonga tempo belegan parton de la venontjara kongreslando, la ant kvan urbon Köln, la konatan fortifikacion Koblenz kaj la nekompareblan Rejnvalon, la mondkonatan banurbon Wiesbaden kaj fine la urbon de la grandaj internaciaj foiroj Frankfurt, kie Esperanto trovis tiel energiajn pionirojn. La organizacio kaj aranĝo de la tuta kunveno kaj de la karavano kuŝas en spertaj manoj, kaj ni jam nun povas promesi plenumon de ĉiuj deziroj rilate al agrablaj tagoj. Cetere GEA (Germana Esperanto-Asocio) plene aprobas la entreprenon kaj pronesis sian helpon al la REVEL-amoj.

Ĉiujn demandojn oni direktu nur al „REVELO“, Köln, Germ., Hohestr. 26.

Ni respondas nur demandojn, al kiuj estas aldonita **nove stampita respondkupono**. Por ŝpari multajn demandojn kaj al ni respondojn oni bonvolu regule tralegi la oficialajn sciligojn en ET.

*REVELO.
(Rejnlanda Vestfalia Esperanto Ligo.)*

Scienco.

Jurista Sekcio de Internacia Scienca Asocio.

Jam aliĝis al Jurista Sekcio 20 samideanoj. Antaŭ la milito la Int. Soc. de Esp. Juristoj kalkulis 122 membrojn. Ni devas baldaŭ atingi kaj trapasi tiun nombron Ĉiuj diplomitaj juristoj kaj studentoj de juro, membroj de Internacia Scienca Asocio, devas nepre skribi al la Sekretario de la Jurista Sekcio, precizigante sian profesion. Ĉiuj jur. Esperantistoj devas aliĝi al la Jurista Sekcio de Int. Scienca Asocio laŭ la adreso de la Sekretario-Kasisto:

Józef Litauer,
subprokuroro de Vars. Trib.
Marszałkowska 81, Warszawa (Polto)

kiu donos ĉiujn informojn. Bonvolu aldoni respond-kuponon por la respondo.

TEKA.

Ĉiuj kuracistoj, kiuj bonvolos kunlabori por la starigo de Esperantista medicina vortaro, estas treege petataj skribi al D-ro Briquet, rue de la Bassée 81, Lille, France, fakestro de ISA por la teknika medicina vortaro.

Inĝenieroj.

La Direktanta Konsilantaro de la Klubo de Inĝenieroj en Rio de Janeiro, en sia lasta kunveno, decidis unuanime aprobi la jenan proponon, prezentitan de d-ro Aarão Reis:

La Direktanta Konsilantaro de la „Klubo de Inĝenieroj“ esprimas la deziron, ke:

a) estu enkondukata, en la programoj de la brazilaj unuagradaj lernejoj, almenaŭ kiel nedeviga, la instruado de **Esperanto** al la geknaboj, kiel la lingvo destinita por helpi la internaciajn interrilatojn;

b) estu enkondukata ankaŭ en la programoj de la brazilaj duagradaj lernejoj la deviga instruado de tiu helpa lingvo;

c) estu enkondukata ankaŭ en la lernadaj programoj de la meitaj, teknikaj kaj sciencaj lernejoj de la tuta Brazilia Respubliko la devigo de **ekzameno de Esperanto** antaŭ la livero de tiu ajn diplomo aŭ atesto de kursfino;

d) estu de ĉiuj intruejoj — meitaj, teknika, scienca, kaj arta — funkciantaj en Brazilio, farataj la plej seriozaj kaj decidaj klopodoj celantaj la antaŭeniran disvastigon de la utiliĝo de **Esperanto** alprenante ĝin — samtempe kun la **nacia lingvo** kaj aliaj ajn fremdaj — en la bulenoj, katalogoj, mapoj, tabeloj, statistikoj, surskriboj, diplomoj, ktp.

La Direktanta Konsilantaro de la „Klubo de Inĝenieroj“ decidas:

a) komisi al komitato de 5 membroj — nomataj de la Prezidanto el la klubanoj — por komenci kaj daŭrigi diligente kaj zorge, la konvenan el-laboron kaj preparon de **teknika vortaro pri inĝenierscienco en Esperanto**;

b) rezervi, en ĉiuj numeroj de sia Revuo kelkajn paĝojn por informoj celantaj la disvastigon de tiu utila helplingvo.

Mallongaj Esp. Sciligoj.

Esperanta Rubriko en „Daily Herald“,

la organo de la Brita Laborista Partio, projektita statempe, ne okazos pro ŝanĝo en la redakcio. La nova ĉefredaktoro sciigas, ke li ne estas preta dediĉi la lokon por konstanta rubriko; li nur povus konsideri por publikigo novaĵon pri Esperanto efektive interesan. La proponon, aranĝi konstantan fakon por Esperanto, iniciatis statempe la redakcio de la ĵurnalo mem.

Esperanto ĉe la Internacia Ekspozicio „La Infano“.

Tiu ĉi ekspozicio okazonta en Budapeŝt de 24. nov. ĝis 3. dec. disponigas unu tablon ekspozician senpage al la Esperantistaro. Oni povas ekspozicii aĵojn rilate al infano kaj Esperanto. Bonvolu tuj sendi do skribaĵojn de infanoj (malpli aĝaj ol 12 j.), fotografaĵojn de infanaj grupoj aŭ infanoj Esperante parolantaj, leterojn, kartojn, lernolibrojn, legolibrojn, bildlibrojn por infanoj (ankaŭ por vendado dum la ekspozicio) ankaŭ Esperante presitajn reklamojn pri ludiloj kaj aliaj por-infanaj aferoj (senpage disdonotaj) al la delegito de UEA en Budapeŝt Paulo Balkányi, Budapeŝt, VI, Hajos u. 15.

En Timiŝvara (Temesvar),

kie okazos la III-a Rumanlanda Kongreso, nia movado marŝas vigle. Oni malfermis 4 paralelajn kursojn kaj 1 por progresantoj kun 100 lern. Gvidas niaj fervoraj s-anoj Bambuch, Hügel, Balint kaj Simon.

La profesorado de la alta teknika lernejo en Praha

(altlernejo por specialaj sciencoj) nomis en sia kunsido 4^a okt. 1922 s-on Aug. Pililík, superan komisaron de ĉs. komercministerio (Praha 11, Kremencová 17) lektoro de Esperanto. La nova lektoro petas inĝenierojn-Esperantistojn, sciigi al li sian adreson en intereso de Esperanta propagando en Ĉeĥoslovakaj inĝenieraj rondo.

En kunveno de la Haga Societo de Amatorfotografantoj

12. okt. s-o J. Ravestein jr. en Hago parolis pri la Esp. Kongreso en Helsinki, montrante sian belan kolekton de ĵumbildoj de la vojaĝo, la urbo, la ĉirkaŭaĵoj kaj la kongresaj okazintaĵoj. Ekmontriĝis, ke la fotografado estas bonega ilo por interesigi diversajn rondojn por la kongresa lando kaj por nia movado.

Esperanto en Ĉeĥoslovakio.

Esperantistoj en Přerov (Moravio) aranĝis 30. sept. paroladon pri Esperanto en halo de Akt. Bierfabrikejo, kiun vizitis ĉirkaŭ 180 personoj, el kiuj ĝis nun anoncis sin 100 geaŭskultantoj por vintra kurso de Esperanto, daŭronta de oktobro ĝis marto 1923. Parolis s-o Pavliček, instruisto el Bystřice p/H.

Propaganda parolado de s-o Josef Hajek okazis en Altrohlaŭ ĉe Karlsbad. Kurso por oficistoj komenciĝis 6. sept. Partoprenas 48 personoj. Gvidas s-o Hajek.

En Hohereľbe 15. sept., komencis kurso por komencantoj sekvota de kurso por progresintoj. Gvidas instr. f-ino Elise Tham.

En Freiburg i. Br. (Germanio)

komenciĝis 10. okt. la unua Esp. kurso en la populakademio en Emmendingen sub la protekto de la tiea ŝtata distrikt-lernejestro. La instruadon partoprenis 31 membroj, kaj ĝi estas gvidata de la UEA-delegito s-o Franz Döring en Freiburg.

Al niaj Orient-francaj gesamideanoj!

Post vizito en Strasbourg de S-o Petit, delegito de l' „Pariza Federacio“, kaj laŭ aranĝo inter CO en Paris kaj la grupoj de Orientfrancando, nia regiona Federacio konsistas nun el la grupoj: Moselle, Meurthe et Moselle, Vosges, Bas-Rhin, Haut-Rhin kaj Haute-Saone.

Mi do tre petas la izolulojn kaj grupojn, kiuj ne ankoraŭ informis nin pri sia ekzistado, bonvolu tuj sendi al „Esperanto-Centro“, 9, Boulevard de la Victoire, Strasbourg, sian adreson.

Pli ol iu ajn alia federacio, „Orientfranca Federacio“, per sia etnografia kaj politika situacio povas ludi por nia movado gravan rolon; estas do nepre necese, ke ĝi estu firme organizata kaj havu realan forton! Ni do grupiĝu ĉiuj ĉirkaŭ nian standardon, ni fratigu pli intime kaj pli ofte, por ke niaj voĉo kaj povo fariĝu potenca!

Hub. Pérez.

La Komitato pri la Internacia Helplingvo de la Amerikana Filologia Asocio

en raporto prezentita 30. XII. 1921 deklaris:

„La Komitato ne estas konvinkita pri la bezono por senperaj komunikoj inter klasoj aŭ grupoj de neinstruitaj aŭ neperfekte instruitaj personoj. Ke senperaj komunikoj estas dezirindaj inter klasoj kaj grupoj de tiaj personoj, kiuj havas komunajn interesojn, oni ne povas kontraŭdiri, sed tiaj rilatoj devas esti neeviteble efektividigitaj per la ĉefoj aŭ reprezentantoj, kaj tiuj povas facile uzi perilojn de komunikado, kiujn la ordinaruloj neniam havus, aŭ la paciencon aŭ la libertempon por ellerni. Tial, laŭ opinio de la Komitato, la vera bezonaĵo estas lingvo, kiu kontentigos la intelektajn kaj estetikajn postulojn de la kleruloj en ĉiuj landoj, kaj tia lingvo apenaŭ povas esti ia alia ol la latina.“

En 1887 la sama societo estis la unua aprobita Esperanton!

Esperanto en Francujo.

La Esp. Federacio de la Pariza regiono kune kun la Pariza gruparo organizas antaŭkongreson en 1923. Komisiono el 5 membroj estas starigita.

Kurso de s-o Gabory en la Popola Universitato de Pantin (apud Paris). La urbestro donis apartan ĉambron en la urbdomo. Kursoj ĉe la komunista ĵunularo de la XVIII-a distrikto en Paris, Inter-sindikata Komitato de Pantin, Kooperativa Societo „La Bellevilloise“, en „Association Polytechnique“ de la XIX-a distrikto en Paris.

En Perpignan (Orientaj Pireneoj) 4 kursoj: por francoj, hispanoj, virinoj, perfektiga. — 8. okt. ĵara bankedo de la grupo, kiun ĉeestis samideanoj el Gvadelupo, Polujo, Hispanujo kaj Germanujo. Favoraj gazetartikoloj.

En Angers nova kurso de Esp. en la ĉambro de urbaj kursoj. — Dum la nacia kunveno de la konvento de Granda Oriento de Francujo (en Paris) s-o Méras disdonis al ĉiuj delegitoj dokumentojn pri Esperanto.

Leterkesto de ET.

La ĉefredaktoro al multaj. Reveninte de dusemajna vojaĝo, mi ŝanĝis mian privatan loĝejon kaj translokiĝis al Mehlum apud Rejno por kolekti novan laborforton en la pura river- kaj arbar-aero. Pro la vojaĝo kaj transloĝigo mi ne povis ĝis nun persone respondi al ĉiuj leteroj kaj poŝtkartoj. En novembro mi certe respondos ĉiujn malnovajn korespondejojn, kiuj bezonas personan respondon. Mia adreso restas la malnova, ĉe ET en Horrem bei Köln.

J. J.

Revuo. Pro teknikaj kaŭzoj nia monata „Revuo“ ankoraŭ ne povis aperi en oktobro. La unua numero certe eliros en novembro, kaj poste la „Revuo“ aperos regule ĉiumonate.

Germanaj poŝtabonantoj

bonvolu atenti la anekson al la hodiaŭa numero kaj tuj pagi la petitan pluprezon, por ke la liverado de ET ne estu interrompata.

Letero el Pola Lando.

Bydgoszcz, oktobro 1922.

Ju pli multnombraj kaj perfektaj estas la diversaj ekspedovojoj, des pli viglaj kaj mongajniĝaj estas speciale la komercaj interrilatoj de koncerna lando. La fervoja stato estas en la pola respubliko tre kontentiga, pliboniĝanta ankoraŭ pro nun konstruotaj ses novaj fervojlinioj. Malpli bona estas la akvovoja stato. La plej multaj interkomunikigaĵovojoj pere de akvo troviĝas en Okcidentpollando; plej malmulte doŭita laŭ nombro kiel ankaŭ laŭ teknika vidpunkto estas la iama rusa teritorio.

La ĉefa porinterilita vejno, la Wista (Vistulo), estas nur parte regulita, nome de la enfluo de l' rivero Przemsza ĝis la loko Zawichost. La tuta meza Vistulo ne estas regulita, kaj preskaŭ dum tuta sezono ne estas ebla tie la navigado. En la tiea Vistulteritorio estas ankoraŭ regulitaj la ambaŭ riveroj Dunajec kaj San kaj en Galicio la Dnjestr (nur parte).

En Okcidentpollando estas menciindaj krom la Vistulo la Brda (Brahe) kaj Noteć (Netze) kun la 179 km longa Bydgoszcz'a kanalo. Tiu ĉi estas la sola pollanda akvovojo troviĝanta en bona stato kaj alkonformigata al la novtempaj bezonoj. La Bydgoszcz'a kanalo transportas ŝipojn ŝargitajn ĝis 400 bareloj. La supera Noteć-rivero, liganta la Bydgoszcz'an kanalon kun la Gopłogago portas ŝipojn de 150 bareloj. La rivero Warta havas por sia ĉelima situo nur lokan signifon. La naturaj akvovojoj kiel la Njemen-kaj Pripetriveroj troviĝas en tute sovaĝa stato. Ekzistas ankoraŭ la Augustowa kaj Ogiński-kanaloj, kiuj tamen estas nur tre primitive aranĝitaj kaj pro la milito tre multe suferadis.

En pola ministerio oni nun prilaboras diversajn projektojn pri novkonstruotaj akvovojoj. Antaŭ ĉio oni penas interligi la Dąbrowan karboregionon kun la Vistulo. Krom tio estas konstruotaj kanaloj inter Poznań—Warszawa (oni kalkulas la koston de tiu ĉi kanalo je 300 milionoj da polaj oraj markoj) kaj inter Danzigo—Supra Silezio. Ĉiu de la ĵus nomitaj kanaloj estos aranĝata por ŝipoj ŝargitaj ĝis 600 bareloj. Krom ankoraŭ kelkaj entreprenotaj novreguligoj de gravaj akvovojoj, oni ankaŭ intencas krei komercohavenon ĉe la Saska Kempa apud Warszawa. — Se oni baldaŭ komencos efektivigi la menciitajn projektojn, Pollando pliriĉiĝos je kelkaj necesaj porinterilitataj vojoj, pligrandigante tiel la bonfarton de la enloĝantaro kiel ankaŭ de la ŝtato mem.

Pola Esperanta Servo.

Gazetaro.

Wiener Handelsblatt, Wien, 4. 10., pri la Internacia Esperanta foirkonferenco dum la XIV-a en Helsinki. Die Volkspolizei, Wien, sept., pri Esp. polica fakgazeto „La Polciisto“.

Die Sicherheits-Exekutive, Wien, sept., pri „Esp. Polica Asocio“.

Wiener Morgenzeitung, Wien, 12. 10., „Alnujo kaj L. de N.“ laŭ ET n-o 104.

Wiener Völker-Echo, Wien, sept., kun bona artikolo de prof. Simon: „Popolar-ligo kaj Popolar-lingvo.“

Die Rote Fahne, Wien, 17. 10., pri „Esenco kaj signifo de l' laborista Esp. movado“.

Průkopník Svobody, Wien, 7. 10., ĉeĥa komunista organo, pri „Esperanto kaj proletariato“.

Nový Jihočeský Věstník, Pacov, Bohem., 1. 10., kun dankletero de Pacov'a Esp. societo al prof. D-ro H. Jokl pro aranĝo kaj gvido de Esp. kurso.

Dělnické Listy, Wien, 11. 10., socialdemokratara organo, por-Esperanta alvoko de Bohema Klubo Esperantista en Wien. Bosphore, franclingva, Constantinople, 21. 9., art. de D-ro Stamatiadis.

Aberdeen Free Press, Aberdeen, 25. 9., art. pri Esp. Hastings Observer, Hastings, 16. 9., dukolona detala raporto de s-o Bonitwood pri la parolado en Rotary Club. Westminster Gazette, 12. 9., du polemikaj leteroj por kaj kontraŭ.

La Bataille, Paris, 14. 9., pri Esp. en Siberio.

Journal de Genève, 8. 9., pri Esp. kaj Ligo de Nacioj.

Reading Observer, Reading, pri per-Esp. vojaĝo de s-o Coleman en Germanujo, Finnlando, Estonujo kaj Polujo.

Journal d'Orient, Constantinople, 26. 9., pri Esp. kaj la pariza komerca ĉambro, 30. 9., pri Esp. kaj Ligo de Nacioj.

La Liberté, Trento, 18. 10., pri Esp. kaj L. de N.

Jutarnji List, Zagreb, 16. 10., pri Esp. kaj L. de N.

L'Indépendant, 17. 10., art. pri Esp.

A Reggel (La Mateno), Vasarnap, 8. 10., kun intervjuo kun s-o Chao-Hsin-Chu laŭ „Esp. Triumfonta“.

L'Information Universitaire, Paris, 2. 9., kun longa artikolo de prof. Carri pri la Ministro de publika instruado kaj Esperanto.

Reichenberger Zeitung, 10. 10., kun humora artikoleto koncernanta Esperanton.

Zittauer Morgen-Zeitung, 1. 4. 10. okt., kun favoraj artikoloj pri la „Tri Esp tagoj en Zittau“, aranĝitaj de la loka grupo kaj artikoloj pri Esp.

Volks-Zeitung, Zittau, 2. 3. 4. 5. 9. 14. okt., pri la tri Esp. tagoj kaj Esp.

Zittauer Nachrichten und Anzeiger, 30. 9. kaj 9. 14. okt., pri la tri Esp. tagoj kaj Esperanto.

Parolejo.

132. Ĉu vi parolas en Esperanto?

Oni ofte respondas al mi: La helplingvo Esperanto disvastiĝas nur, kiam oni parolos ĝin ĉe la stacidomoj, ĉe la aŭtrelaj aŭ nubteraj vagonaroj, ĉe la vaporiŝipoj, ĉe la doganejoj, ĉe la policejoj, ĉe la hoteloj, ĉe la muzeoj, ĉe la restoracioj, ĉe la magazenoj, ĉe la bankoj ktp.

Kontraŭ la ne-Esperantistoj efektive ne sufiĉas porti la verdan stelon!

Ĉiu Esperantisto, vojaĝante eksterlanden, eĉ se li scius la nacian lingvon, estas afable petata ĉiam unuc demandi: „Ĉu vi parolas en Esperanto?“

Nur per tiu ĉi senĉesa demando Esperanto triumfos. Gesamideanoj, ne forgesu tiun oportunan peton kaj fidu al tia ĉiumomenta demando!

Neniu kapablas ekscii, ĉu vi mem parolas en Esperanto: do komencu kaj tiel veku ĉies atenton!

G. D. el Paris.

133. Pri „la vere bezonataj kongresoj“.

(Parolejo 129 en n-o 106.)

Via artikolo min tre interesis. Tamen mi devas konstati, ke mi ne komprenis ĝin. Ĉi foje ekstrikis mia cerba maŝino! Mi sentetas eble tute malklare, kion vi volas diri per ĉi tiu artikoleto ... ĉu la aliaj legantoj estas pli felikaj ol mi? Mi legis la artikoleton pli ol dekofoje, sed ankoraŭ regas mistera mallumo en la profunda abismo de mia animo ... mi malĝojas pro tio! Ĉu vi ne povus lumigi kandelon?

Hontoplena Malsaĝulo.

Recenzejo.

LIBROJ.

MIA AMIKO de P. Htrov. Esp. legajoj kolektitaj. 48-paĝa 11 : 15 cm. Propra eldono. Prezo ne montrita.

Se ni havas tiom da bonaj noveloj, sciencaj verkoj ktp. kiom ni havas legolibretojn, ni havas vere respektindan literaturon. Ŝajnas preskaŭ kvazaŭ inter la Esperantistaro ne jam estas sufiĉe da kleraj aŭ instruitaj personoj, kiuj mem povas verki ion bonan. Tial nun ĉiu kiu deziras vidi presitan verkon kun sia nomo kiel aŭtoro kompilas kelkajn, nur „plej bonajn“ spritaĵojn, rakontojn, fabelojn ktp., aldonas proprajn ĝispleno de la ŝiksita nombro de paĝoj, kaj jen „nia literaturo denove pliriĉiĝis.“ Cu ni fakte ne pli bone povas uzi niajn fortojn? Oni kreu respektindajn librojn!

Tamen „mia amiko“ estas unu el la plej bonaj de sia speco. Ĝi enhavas niajn klasikulojn Zamenhof, Kabe k. a. kaj en la cetera parto estas vere internacia laŭ deveno de la tradukitaj originaloj. (HaHu.)

GAZETOJ.

Sennacieca Revuo, okt. kun detala raporto pri la 2. SAT-kongreso en Frankfurt a. M. (Germanujo).
Marto, sept., okt.
Berliner Esperanto-Mitteilungen, okt.
Kataluna Esperantisto, aŭg.-sept.
Konkordo, jul.-aŭg.-sept.

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.
MALPERMESA LEĜO EN FINNLANDO, parolado de s-o Salokannel en la XIV-a Universala Esp. Kongreso en Helsinki. Prezo 1 fmk. Eldonis Kiettolakihito, Helsinki. Ĉi tiu okpaĝa broŝureto interese informas pri la kontraŭalkohola movado en Finnlando kaj la kontraŭalkohola leĝo.

AFIŜO (varbilo) „Esperanto-Lingvo Internacia“, 31^{1/2} : 47^{1/2} cm, dukolore presita; libera spaco por sciigoj. — La aŭto estas uzebila en ĉiuj landoj.
Prezo: 12 gmk., 10 ekz. 110 gmk. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Ader, Dresden a. 27.

Holandanoj!

La plej bona donaco, kiun vi povas doni al via konatulo, okaze de Naskiĝtago, Sankta Nikolao, Kristnasko estas

Bona Esperanta libro

el la
Centra Esperanto Librejo

Bankastraat 2a
Hago, Telefono
H. 6703. Poŝtkonto H. 19450.

Hebreaj Esperantistoj kaj Esperantaj Eldonistoj

La propagando de Esperanto inter hebreoj iras malrapide pro manko de lernolibroj en jargono kaj hebrea lingvo. Ni havas nun okazon liveri mal-kare kelkajn da lernolibroj en jargono kaj antikva lingvo hebrea, de konata aŭtoro Hanec Neimanoviĉ.

Mendojn akceptas la Esperanto-Oficejo „Renoma“, Warszawa, Marszałkowska 91.

Posteno

kiel infanvarstila serĉata por nepre fidinda 43-jara fraŭlino. Bonegal referencoj. Mian adreson bonvole sendas f-ino P. Mrkvičková, Hradec Králové 511, Ĉeĥoslovakujo.

En specialaj aŭ eksteraj numeroj specialaj prezoj.

NASKIĜO. Al s-o D-ro Rudolf Carnap, Buchenbach (Baden). Germ., naskiĝis filo Johannes.

MORTO. La 12. sept. mortis post grava malsano f-ino Katerino Kéthly, fervora Esperantistino en Budapeŝto. La ferlaborisia Esp. grupo funebrias kun multaj gesamideanoj la morton de tiu 17-jara fraŭlino.

ARKITEKTINGENIERA STUDENTO por ebliĝi sian studadon petas kiun ajn komision; presigas presaĵojn pro la hungara valuto malpli kostajn ktp. Samideanoj subtenu min per labordono! Johano Tomán, Budapeŝto IX., Gát str. 25 1/8.

INGENIEROJ-ARKITEKTOJ! Kiu el vi senprokraste interkorespondas kun mi pri konstruaĵoj el argilo? J. Grünthal, Haapsalu, Estonio, poŝtk. 15.

TORINO (Italio). Depoŝta la 1. sept. „Esperanto Triumfonta“ estas vendata ĉe la kiosko de ĵurnalvendejo en Placo Kastello angulo sirato Via Roma pro interesigo de la Torino Esp. Asocio, kiu baldaŭ malfermos novajn kursojn en la publikaj lernejoj.

GRAVA INFORMILO por ĉiuj korespondantoj kaj kolektanto! BES-a Adresaro. Nova, kvara eldono. Prezo 1.50 avis. fmk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 150 mk. afrankite. Tuj sendado post pago. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ.)

28-JARA FRAŬLO deziras interkorespondi kun serioza fraŭlino por pli posta edziĝo. Adreso: S-o M Maciejowski, (ĉe Kruszczyński), Bydgoszcz, Św. Trójcy 12e (Polio).

BUDAPEST!

24. Nov. — 3. Dec. 1922

Internacia Ekspozicio „LA INFANO“

Informoj ĉe:
Johann W. Kechlik, Berlin, N. 9. Linkstr. 25.
Hamburg Paulstr. 8.
Adolf Boger, München, Olgastr. 3.
Hungara Fremdulaŭtika kaj Ekspozicia A. S., Budapest, Vilmoscsászár ut 33. 1.
Idengenforgalmi

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13
Telefona: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpaperoj.
Procentado de kontantaj deponoj.
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
Perado de ĉiuspecaj negocoj.

Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jasło, Pol.

(Posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld.)

Bankkontoj:	Poŝtekaĵoj:
Wiener Bank Verein, Wien I	Leipzig n-o 89773
Wohl & Cie, Danzig	Praha n-o 59354
Bank Malopolski	Varsovio n-o 140 683
Bankdomo Kornfeld	Zürich n-o 7263

Ni liveras ĉiujn Esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni. Inter aliaj ni rekomendas

el originaloj:
Belmont, Leo: Sonoj Esperantaj, bind.
Boucon, H.: Humoroj
Elski kaj Eska: Unuaj agordoj
Grabowski, Antoni: Nova Antologio
Grenkamp, Salo: Krijo de l' koro
Sapiro, J.: Babiladoj de bonhumora Zamenhofano.

el tradukoj:
Balucki: Ama bileto, trad. Ender
Grabowski, A.: El parnaso de popoloj
Grenkamp, Salo: Penseroj
Kabe: Internacia Krestomatio
Mickiewicz, A.: Sinjoro Tadeo, trad. Grabowski
Orzeszko, E. A.: A. B. C., trad. Ender
Prus, Bolesław: Pekoj de l' infaneco, tr. Grabowski
Przybyszewski, St.: La neĝo, trad. Ficovski

Por la ajn demando aldonu por respondo. Kontraŭ respondkuponon ni forsendas nian prezaron. Per rapidega senvalorigo de nia monvaloro — sekve plialtiĝo de prezoj — ni ne povas cili la prezojn.

Jus aperis
necesa por propagando kaj kursoj.
Kompletny Podręcznik
języka międzynarodowego
Esperanto

Verkita de Leo Turno
72-paĝa kun enaŭparolo de Bronisław Kuhl
La prezo 250 pol. mk.
Al mendantoj de alm. 25 ekz. konvena rabato.
Ricevebla nur post enaŭta pego.

La adreso:
Leon Schlechtkorn, Kraków, Pol., Dluga 15.
Poŝtulu pŝkasan transpagilon.

ĈIU IDEKONSCIA ESPERANTISTO legu „La Nova Epoko“! Prezente tiom de intermita kultur-literatura almanako, ĝi ne enpresas materialon kun pasanta intereso. Tial ĉiu klerulo de „La Nova Epoko“ estas ĉiam freŝa kaj nova. Aperis n-oj 1, 2 kaj 3. Postulu ĉe la eldonejo (1-a Tverskaja-Jamskaja 33, lg 5., Moskvo-Rusio), sendante per monbileto sumon egalvaloran al afranko de eksterlanda registrita letero por ĉiu numero. Abonkondiĉojn rigardu el ET n-oj 103—106.

PREZIDANTO de ASTRAHANA SOCIETO ESPERANTISTA, Astrahanj, Armjanskij most 111, G. Artemjev, Rusio, deziras korespondi kun tuta mondo letere ĉiutage kaj ricevadi helpapermonon, mondĵurnalojn, muziknotojn (prefero operoj), il. poŝtkartojn, fotografaĵojn de gesamideanoj, Esp. librojn kaj aliajn Esperantaĵojn kaj specimenojn de komercaĵoj, katalogoj, prospektoj por Komercia Oficejo. Interŝanĝe sendos suprenomitan, ankaŭ pm. kaj ĉion deziran. Deziras aboni por 1923 naciajn Esp. ĵurnalojn. Rekompencos per ĉio dezirata. Linne ne sendas. Por respondo aldonu respondkuponon. Sendu registrite!

SERIOZEGAJ POLAJ FABRIKISTOJ rekomendas profite al pogranda eksporto: malkarajn korbmeblojn, fadenajn buŝonojn por tojloj (manlaboro), tapiŝojn, flankkurtenojn ktp. Informdanto: Prof. Miecz. Sygnarski, Bydgoszcz, Kordeckiego 19, Wielkopolska (Polujo).

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

S-o Bazilo Averin, 6 uĉ. 3 Bakalda, N-o 30, Astranan (Rusio), deziras korespondi.

S-o Henri Trommelen, Boerhavestraat 65, Antwerpen (Belgio), deziras korespondi per poŝtkartoj kun ĉiuj landoj. Deziras korespondadon kun polisticoj ĉiulandaj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. Paul Männchen, Breslau VI, III, Polizeil-Bereitschaft, Westend-Kaserne. (Germ.)

S-o Jozef Wauters, de Conincksplein 7, Antwerpen (Belgio), deziras korespondi kun alilandanoj per ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj.

S-o Francisko Kéder, Ujpest, Nyár u. 73, Hungarlando, deziras nur poŝtkartojn interŝanĝi, sed nur kun seriozaj filatelistoj ĝis 300 pecoj!

Eau de Cologne,

★ Parfumo, Tualetitaj ktp. ★
Aug. Junker, Köln a. Rh., Hohestrasse 26, Germ.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝteka n-o 28420.
Brazilo: Brazilo Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Hr. Gaševski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenu.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallin.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.
Hungara: Paŭlo Balkányi, Halos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga. 16-V, Kitamachi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvia: Talivaldo Indra, Riga, Pasta kaste 478.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaŭna (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein Jr., v. Aerssensstraat 200, 's-Gravenhage. (1-oŝteka konto Haag n-o 2678.)
Polia: Adolfo Oberholman, Krak., Przem. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkasto n-o 630.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

LA SENLINGVULO

estas ankoraŭ ricevebla.

295-paĝa romano, plena de interesaj okazintaĵoj.

Prezo (inkluzive sendkostoj)
por bonvalutuloj 320.— gmk.
(aŭ 1 sviz. fmk.)
por mezbonvalutuloj 200.— gmk.
por malbonvalutuloj 160.— gmk.

Butin & Jung, Godesberg, Germanlando
Poŝteka konto Köln 92036.

Mi deziras aĉeti

„Raschel“-Maŝinon

(markoj: W. Barfuss, Apolda; Knobloch, Apolda; aŭ alia marko).

„Kreuzspul“-Maŝinon

de fabriko P. Voigt, Chemnitz, sistemo n-o 6.

Mi aĉetus ankaŭ ne nova'n, se ili troviĝas ankoraŭ en bona stato.

Fadenfabrikejo

A. Kranzenblum,

Warszawa, Pol., Nalewki 37/15.

LA PLEJ LASTA ELTROVAĴO!!!

LA FORNO „MOUSSON“

superas ĉiujn ĝisnunajn fornojn! Por domoj, ĉambroj, oficejoj, fabrikoj ktp. La varmeco iras al mal-supre. Ĉio forbrulas Ne restas videbla fumo Plej granda eluzo de ĉiuj brulaĵoj. Uzebla por ĉiuj hejlmaterioj. Patentoj anonciitaj en ĉiuj landoj!

Licencoj doneblaj al multaj landoj por fabrikado!

Informojn peras la del. de UEA por Budapeŝto: Paulo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.

La Steloj

anonas vian sorton!

Mi sciigas al vi vian horoskopon bazantan sur nepre sciencia bazo. Ĉi estos al vi en ĉiuj animaj kaj materialaj vivdandoj certa konsilanto kaj helpanto. Preciza matematika kompilo, detala kaj individua aŭguro, apliko de plej novaj psikologiaj helpiloj. — Oni scigu al mi la lokon, jaron tagon kaj horon de naskiĝo; skribspecimeno (eventuale bildo) dezirata. — Horoskopo gmk. 1500.—

Freifrau Irene v. Veldegg, Niederlössnitz (bei Dresden), Lindenaustasse 9, Germanujo.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

(ĉefo: H.A. Scharwächter)

63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

La tuta mondo konas la nekompareblan Italian marurbon

VENEZIA

sed ne ĉiu konas la „mostarda veneziana“, ĝian el diversaj sudlandaj fruktoj faritan specialaĵon. — Postulu prezaron pri niaj mondkonataj specialaĵoj: Marrona glacé, torrone, glaciĝitaj kaŝtanoj envolvitaj en ŝtanfolio ktp. — Seriozaj reprezentantaj serĉataj.

Confiserie Italienne, Milano
Via Crocefisso 16 (Italio).



Kopilibro de Günter

por skribado kun aĉato aŭ kralono por ĉiuj celoj. Eksperto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Emil Günter,
Freiburg i. Br. (Germ.),
Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilibro.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du alnekvaj enprezoj) kostas po du enprezoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.40 leno, 0.80 hfl., 1 nord. kr., 1 fl., 1 avis. fmk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fmk., 2 esk., 3 lir., 6 kč., 7 fmk., 10 din., 18 lejloj, 120 gmk., 120 hung. kr., 600 pmk., 4000 aŝir. kr. Ĉiu povas pagi per la aln. el la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurso de sia propra valuto; aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fmk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo. — Adresajn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli.

En specialaj aŭ eksteraj numeroj specialaj prezoj.

NASKIĜO. Al s-o D-ro Rudolf Carnap, Buchenbach (Baden). Germ., naskiĝis filo Johannes.

MORTO. La 12. sept. mortis post grava malsano f-ino Katerino Kéthly, fervora Esperantistino en Budapeŝto. La ferlaborisia Esp. grupo funebrias kun multaj gesamideanoj la morton de tiu 17-jara fraŭlino.

ARKITEKTINGENIERA STUDENTO por ebliĝi sian studadon petas kiun ajn komision; presigas presaĵojn pro la hungara valuto malpli kostajn ktp. Samideanoj subtenu min per labordono! Johano Tomán, Budapeŝto IX., Gát str. 25 1/8.

INGENIEROJ-ARKITEKTOJ! Kiu el vi senprokraste interkorespondas kun mi pri konstruaĵoj el argilo? J. Grünthal, Haapsalu, Estonio, poŝtk. 15.

TORINO (Italio). Depoŝta la 1. sept. „Esperanto Triumfonta“ estas vendata ĉe la kiosko de ĵurnalvendejo en Placo Kastello angulo sirato Via Roma pro interesigo de la Torino Esp. Asocio, kiu baldaŭ malfermos novajn kursojn en la publikaj lernejoj.

GRAVA INFORMILO por ĉiuj korespondantoj kaj kolektanto! BES-a Adresaro. Nova, kvara eldono. Prezo 1.50 avis. fmk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 150 mk. afrankite. Tuj sendado post pago. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Butin & Jung, Godesberg (Germ.)

28-JARA FRAŬLO deziras interkorespondi kun serioza fraŭlino por pli posta edziĝo. Adreso: S-o M Maciejowski, (ĉe Kruszczyński), Bydgoszcz, Św. Trójcy 12e (Polio).

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj (escepte Francujo) per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtkartojn. Bonnard Maurice, 16 Bd. Gallieni Quinay sous Bois Set O, Saint Quen, Francujo.

A. Rothe, Lugau i. Sa. (Germanujo), deziras korespondi pri ĉiuj temoj; interŝanĝas poŝtkartojn kaj fotografaĵojn kun la tuta mondo.

S-o Richard Oesterreicher, Wien V, Embelgasse 51, Aŭstrujo, deziras korespondi kun la tuta mondo; interŝanĝas poŝtkartojn.

S-o Giovanni Azzola Ferdinandsberg, Bánát, Rumanio, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandanoj (koresp. Esperanto kaj itale).

Frieda kaj Herta Gruber, Reichenberg, Robert-Blumstrasse 15, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiulandanoj.

Du amikinoj: Agnes De Bruyn, Schoolstraat 33, Lokeren, kaj Célestine Müller, Luikstraat 111, Lokeren (Belgio) deziras korespondadi poŝtkarte aŭ letere kun ĉiulandanoj. S-o Bronisław Kruszczyński, Bydgoszcz, Św. Trójcy 12e (Polio), interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiuj landoj, ne sendas unue S-ino Stefanja Kruszczyńska (sama adreso) interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn (bfl.).

Poŝtkartojn, monerojn, papermonon interŝanĝas kun ĉiulandanoj Jan Rux, Bydgoszcz, Paderewskiego 6 (Polando).

S-o Ed. Strecker, Bydgoszcz, Berlińska 36 (Polio), deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Interŝanĝas ankaŭ poŝtkartojn. Konstanty Chmielewski, libristo, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a, volas interŝanĝi polajn poŝtkartojn pogrande (de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur nedifektajn.

Kvar amikinoj: f-ino Germaine Engels, St. Vincentusstraat 67, f-ino Eugénie Engels, St. Vincentusstraat 67, f-ino José van Looveren, Lange Slachterijstr. 117, f-ino Jozefina Braeckmans, Lange Slachterijstr. 97, ĉiuj el Antverpeno (Belgio) deziras korespondi kun la tuta mondo per leteroj kaj poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn.